# TEJO-aktuale: numero 221, 2009-07

## TEJO serĉas volontulon!

- TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo.

TEJO-volontulo devas preti labori dum 10-18 monatoj (pli aŭ malpli longa daŭro esceptokaze ankaŭ eblas, ni preferas almenaŭ tutan jaron) ekde tiam, kiam la periodo de volontulado de la nuna TEJO-volontulo Paŭlo Ebermann finiĝos, do ekde septembro 2009 (preciza dato laŭ interkonsento). La limdato por kandidatiĝi estas ĵaŭdo, la 16a de julio 2009 (alventempo de retmesaĝo aŭ paper-letero, ne sendodato). Ni bonvenigas ĉiujn kandidatojn prezenti sin dum IJK (18a ĝis 25a de Julio, Liberec, Ĉeĥio). Tamen, ĉeesto dum la IJK ne estas kondiĉo. Legu pli: http://www.tejo.org/eo/volontulu

## Renkontiĝoj trovebla per www.esperantoland.de

- 7a SOMERE, 1a - 8a de aŭgusto 2009 en Jünkerath, Germanio http://www.esperantoland.org/somere/

8a Novjara Renkontiĝo (NR), 27a de dec. 2009 - 3a de jan. 2010 en Saarbrücken, Germanio
http://www.esperantoland.org/nr/

## Novjara Internacia Semajno (NIS), 27-a de decembro 2009 - 3-a de januaro 2010, Saarbrücken, Germanio

- Ĉu vi aĝas inter 14 kaj 30 jaroj? Ĉu vi deziras festi ĉi-jarfine en Germanio, tuj apud la franca landlimo? Jen ni invitas vin al la unua "Novjara Internacia Semajno" (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj en Saarbrücken, apud la franca landlimo de la 27-a de decembro 2009 ĝis la 3-a de januaro 2010: http://www.esperantoland.org/nis/

<br>
La unua NIS okazos samtempe kun la 8-a Novjara Renkontiĝo (NR). Jam dum la pasintaj jaroj pli kaj pli da junuloj en NR estis super 14 jaroj (pasintjare estis entute 18 junuloj kaj junaj plenkreskuloj en NR). Kreiĝis por ili pli kaj pli da specialaj programeroj. Ĉi-jarfine ni planas daŭrigi tiun vojon kaj grandigi la programon laŭ la deziro de la partoprenantoj kaj kun viaj ofertoj. Se vi interesiĝas, prefere baldaŭ ĵetu rigardon al la retpaĝo de NIS - ankoraŭ ĝis la 5-a de julio validas eta rabato.

## Vinilkosmo ofertas mp3-elŝutejon

- karaj ŝatantoj de esperanto-muziko,

Post longega preparado finfine ni havas la plezuron anonci al vi ke ni malfermas publike novan retejon (MP3-servo) komplementa al la jam konata www.vinilkosmo.com kiu ebligos al vi akiri laŭleĝe per elŝutado esperanto-muzikojn. La retejo evoluos en la venontaj monatoj ĉar momente nur la kategorioj “Popo -roko -hiphipo – elektronik” kaj “kanzono – tradicia” estas provizitaj per la eldonitaj albumoj de Vinilkosmo. Sekve la ceteraj albumoj de la katalogo de Vinilkosmo estos iom post iom aldonitaj laŭ la interkonsentoj kun la artistoj. Ni invitas vin viziti kaj malkovri tiun ĉi novan servon de Vinilkosmo kaj antaŭ ĉio por bone kompreni kiel funkcias la MP3-servo bonvolu legi la Helpkonsilojn en la maldekstra menuo malsupre ĉe “Informoj”. Mi esperas ke tiu nova retejo plaĉos al vi kaj ke vi venos ofte viziti ĝin kaj sekvi kiel ĝi evoluas ... Notu bone la adreson :http://www.vinilkosmo-mp3.com bonan viziton ...
Espereble ankaŭ ĝis revido tre baldaŭ en la someraj festivaloj KEF en Helsinoro (Danio) http://www.kef.saluton.dk kaj FESTO en Zwingenberg (Germanio) http://esperanto-jeunes.org/Programo-de-Festo-2009.
Informo disvastigenda kiel eble plej amplekse..
Antaŭdankojn !..
Plej muzikajn salutojn, Flo !

### Invito al FESTO!!, 8an ĝis la 15an de aŭgusto, Zwingenberg (Bergstraße), Germanio

- Ĉi-jare Festo okazos en Germanio en la urbo Zwingenberg de la 8an ĝis la 15an de aŭgusto. Por aliĝi: http://festo.esperanto-jeunes.org/

Por ĝui esperantan etoson tuj post IJK, UK kaj MIRO, vi povas retrovi nin en FESTO. Vi ŝatas muzikon? *Multaj koncertoj* atendas vin: Supernova, Kapriol', Pafklik.... Vi deziras ekkoni novajn homojn el ĉiuj landoj? Festo estas la ĝusta loko.
Vi deziras retrovi amikojn? Invitu ilin!!!!
Se vi venas el Francio, el Kroatio aŭ el Germanio kaj ne volas vojaĝi sole, jam *pluraj karavanoj* estas organizitaj (eĉ *senpaga karavano* el Strasburgo!!!).
Eblas ankaŭ jam antaŭmendi la novan *T-ĉemizon* de Festo je via grandeco. Ĝi atendos vin je via alveno en Festo. Ĝis FESTO!!!

### Patroniĝo

- Fariĝu konscia subtenanto de TEJO! Fariĝu patrono de TEJO Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, vi ankaŭ ĝuas proksiman partoprenon en la junulara movado, ĉar de TEJO vi ricevas: Legi pli: http://tejo.org/eo/patrono

### Internacia muzik-grupo!

- Saluton, gekaraj

Mi estas Renata Ventura, el Brazilo, kaj mi volis krei internacian muzik-grupon. Mi jam havas eblan nomon por la muzik-grupo: "NKD" NKD estas malongigo de "Nekredeble", kaj povas esti dirita en iu ajn lingvo! Kion mi volas diri per la vorto "Internacia"? Unu membro po lando.

Ĉiuj membroj farus iliajn partojn en siaj propraj landoj kaj ni kuniĝus la partojn interrete. Sed mi volis ke ĝi estu ege profesia - kvalite. Ĉar mi volis ke la muzik-grupo fariĝu fama for de Esperantujo, por ludi bonkvalitajn, agrablajn, belajn kaj eĉ amuzajn kanzonojn. Mi povas kanti. Mi ja kantas bone.
Kiu volas helpi min? Kiu jam havas bonajn leterojn ankoraŭ ne muzikigitajn? Aŭ bonajn ideojn por kanzonoj? Mi kreis kelkajn retejojn kie oni povas pridiskuti tion, kaj partoprenas el aliaj. Legu pli: Usona retejo www.esperantous.ning.com, Esperantuja retejo www.esperantujo.ning.com

### Kriptogramo okaze de 44a Brazila Kongreso de Esperanto

- *Petu la kriptogramon de la aŭtoro, JOSÉ SARAIVA MATOS, 91-jara brazila esperantisto, per resgatesaraiva ĉe ig.com.br*

### Internacia Junulara Kongreso (IJK)

- La Bamba, nokta vivo, amuziĝo sed ankaŭ kunsidoj, prelegoj, trejnadoj kaj laborgrupoj. Ĉio okazas dum unu vigla semajno, spertinda por ĉiu juna esperantisto! La IJK estas la plej granda junulara esperanto-aranĝo kaj okazas ĉiujare en alia lando organizita de niaj landaj sekcioj kaj lokaj aktivuloj kunlabore kun TEJO.

La sekva IJK okazos en Liberec, Ĉeĥio inter la 18a de Julio ĝis la 25a de julio 2009 (tuj antaŭ la UK en Bialystok). La IJK 2008 okazis en Szombathely, Hungario, inter la 26a de Julio ĝis la 2a de aŭgusto 2008. Legu pli : http://tejo.org/eo/ijk_enkonduko

### Venontaj renkontiĝoj

- Aliĝu al la IJK en Liberec'! 18.7.2009 – 25.7.2009, Ĉeĥio http://www.tejo.org/ijk/;

94a Universala Kongreso de Esperanto, 25a Julio ĝis 1a de Aŭgusto 2009, Białystok, Pollando http://tejo.org/eo/node/787;

ILEI konferenco okazos la 17-25an de julio 2009 en Krakovo, Pollando http://www.ilei.info/agado/Krakovo.php;

Aŭgusto 2009 - Itala Kongreso en Cassino http://tejo.org/eo/node/819;

8. Kekso Esperanto-renkontiĝo (25.09. - 27.09.09) en Dessau, Germanio http://www.tejo.org/eo/node/915;

Venu al someraj kursoj en franca kastelo Greziljono http://gresillon.org/eventoj/programo_staĝoj_2009.doc;

Invito al FESTO!!, 8an ĝis la 15an de aŭgusto, Zwingenberg (Bergstraße), Germanio http://festo.esperanto-jeunes.org/;

7a SOMERE, 1a - 8a de augusto 2009 en Jünkerath, Germanio http://www.esperantoland.org/somere/
8a Novjara Renkontiĝo (NR), 27a de dec. 2009 - 3a de jan. 2010 en Saarbrücken, Germanio http://www.esperantoland.org/nr/
Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ĉ. 14 - 30jaraj) 27-a de dec. 2009 - 3-a de jan. 2010 en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nis/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu

### TEJO serĉas volontulon!

- TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. TEJO-volontulo devas preti labori dum 10-18 monatoj (pli aŭ malpli longa daŭro esceptokaze ankaŭ eblas, ni preferas almenaŭ tutan jaron) ekde tiam, kiam la periodo de volontulado de la nuna TEJO-volontulo Paŭlo Ebermann finiĝos, do ekde septembro 2009 (preciza dato laŭ interkonsento). La limdato por kandidatiĝi estas ĵaŭdo, la 16a de julio 2009 (alventempo de retmesaĝo aŭ paper-letero, ne sendodato). Ni bonvenigas ĉiujn kandidatojn prezenti sin dum IJK (18a ĝis 25a de Julio, Liberec, Ĉeĥio). Tamen, ĉeesto dum la IJK ne estas kondiĉo. Legu pli: http://www.tejo.org/eo/volontulu

### Renkontiĝoj trovebla per www.esperantoland.de

- 7a SOMERE, 1a - 8a de aŭgusto 2009 en Jünkerath, Germanio http://www.esperantoland.org/somere/
8a Novjara Renkontiĝo (NR), 27a de dec. 2009 - 3a de jan. 2010 en Saarbrücken, Germanio http://www.esperantoland.org/nr/

### Novjara Internacia Semajno (NIS), 27-a de decembro 2009 - 3-a de januaro 2010, Saarbrücken, Germanio

- Ĉu vi aĝas inter 14 kaj 30 jaroj? Ĉu vi deziras festi ĉi-jarfine en Germanio, tuj apud la franca landlimo? Jen ni invitas vin al la unua "Novjara Internacia Semajno" (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj en Saarbrücken, apud la franca landlimo de la 27-a de decembro 2009 ĝis la 3-a de januaro 2010: http://www.esperantoland.org/nis/
<br>
La unua NIS okazos samtempe kun la 8-a Novjara Renkontiĝo (NR). Jam dum la pasintaj jaroj pli kaj pli da junuloj en NR estis super 14 jaroj (pasintjare estis entute 18 junuloj kaj junaj plenkreskuloj en NR). Kreiĝis por ili pli kaj pli da specialaj programeroj. Ĉi-jarfine ni planas daŭrigi tiun vojon kaj grandigi la programon laŭ la deziro de la partoprenantoj kaj kun viaj ofertoj. Se vi interesiĝas, prefere baldaŭ ĵetu rigardon al la retpaĝo de NIS - ankoraŭ ĝis la 5-a de julio validas eta rabato.

### Vinilkosmo ofertas mp3-elŝutejon

- karaj ŝatantoj de esperanto-muziko,

Post longega preparado finfine ni havas la plezuron anonci al vi ke ni malfermas publike novan retejon (MP3-servo) komplementa al la jam konata www.vinilkosmo.com kiu ebligos al vi akiri laŭleĝe per elŝutado esperanto-muzikojn. La retejo evoluos en la venontaj monatoj ĉar momente nur la kategorioj “Popo -roko -hiphipo – elektronik” kaj “kanzono – tradicia” estas provizitaj per la eldonitaj albumoj de Vinilkosmo. Sekve la ceteraj albumoj de la katalogo de Vinilkosmo estos iom post iom aldonitaj laŭ la interkonsentoj kun la artistoj. Ni invitas vin viziti kaj malkovri tiun ĉi novan servon de Vinilkosmo kaj antaŭ ĉio por bone kompreni kiel funkcias la MP3-servo bonvolu legi la Helpkonsilojn en la maldekstra menuo malsupre ĉe “Informoj”. Mi esperas ke tiu nova retejo plaĉos al vi kaj ke vi venos ofte viziti ĝin kaj sekvi kiel ĝi evoluas ... Notu bone la adreson :http://www.vinilkosmo-mp3.com bonan viziton ...
Espereble ankaŭ ĝis revido tre baldaŭ en la someraj festivaloj KEF en Helsinoro (Danio) http://www.kef.saluton.dk kaj FESTO en Zwingenberg (Germanio) http://esperanto-jeunes.org/Programo-de-Festo-2009.
Informo disvastigenda kiel eble plej amplekse..
Antaŭdankojn !..
Plej muzikajn salutojn, Flo !

### Invito al FESTO!!, 8an ĝis la 15an de aŭgusto, Zwingenberg (Bergstraße), Germanio

- Ĉi-jare Festo okazos en Germanio en la urbo Zwingenberg de la 8an ĝis la 15an de aŭgusto. Por aliĝi: http://festo.esperanto-jeunes.org/

Por ĝui esperantan etoson tuj post IJK, UK kaj MIRO, vi povas retrovi nin en FESTO. Vi ŝatas muzikon? *Multaj koncertoj* atendas vin: Supernova, Kapriol', Pafklik.... Vi deziras ekkoni novajn homojn el ĉiuj landoj? Festo estas la ĝusta loko.
Vi deziras retrovi amikojn? Invitu ilin!!!!
Se vi venas el Francio, el Kroatio aŭ el Germanio kaj ne volas vojaĝi sole, jam *pluraj karavanoj* estas organizitaj (eĉ *senpaga karavano* el Strasburgo!!!).
Eblas ankaŭ jam antaŭmendi la novan *T-ĉemizon* de Festo je via grandeco. Ĝi atendos vin je via alveno en Festo.
Ĝis FESTO!!!

### Patroniĝo

- Fariĝu konscia subtenanto de TEJO! Fariĝu patrono de TEJO Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, vi ankaŭ ĝuas proksiman partoprenon en la junulara movado, ĉar de TEJO vi ricevas: Legi pli: http://tejo.org/eo/patrono

### Internacia muzik-grupo!

- Saluton, gekaraj

Mi estas Renata Ventura, el Brazilo, kaj mi volis krei internacian muzik-grupon. Mi jam havas eblan nomon por la muzik-grupo: "NKD" NKD estas malongigo de "Nekredeble", kaj povas esti dirita en iu ajn lingvo! Kion mi volas diri per la vorto "Internacia"? Unu membro po lando.

Ĉiuj membroj farus iliajn partojn en siaj propraj landoj kaj ni kuniĝus la partojn interrete. Sed mi volis ke ĝi estu ege profesia - kvalite. Ĉar mi volis ke la muzik-grupo fariĝu fama for de Esperantujo, por ludi bonkvalitajn, agrablajn, belajn kaj eĉ amuzajn kanzonojn. Mi povas kanti. Mi ja kantas bone.
Kiu volas helpi min? Kiu jam havas bonajn leterojn ankoraŭ ne muzikigitajn? Aŭ bonajn ideojn por kanzonoj? Mi kreis kelkajn retejojn kie oni povas pridiskuti tion, kaj partoprenas el aliaj. Legu pli: Usona retejo www.esperantous.ning.com, Esperantuja retejo www.esperantujo.ning.com

### Kriptogramo okaze de 44a Brazila Kongreso de Esperanto

- *Petu la kriptogramon de la aŭtoro, JOSÉ SARAIVA MATOS, 91-jara brazila esperantisto, per resgatesaraiva ĉe ig.com.br*

### Internacia Junulara Kongreso (IJK)

- La Bamba, nokta vivo, amuziĝo sed ankaŭ kunsidoj, prelegoj, trejnadoj kaj laborgrupoj. Ĉio okazas dum unu vigla semajno, spertinda por ĉiu juna esperantisto! La IJK estas la plej granda junulara esperanto-aranĝo kaj okazas ĉiujare en alia lando organizita de niaj landaj sekcioj kaj lokaj aktivuloj kunlabore kun TEJO.

La sekva IJK okazos en Liberec, Ĉeĥio inter la 18a de Julio ĝis la 25a de julio 2009 (tuj antaŭ la UK en Bialystok). La IJK 2008 okazis en Szombathely, Hungario, inter la 26a de Julio ĝis la 2a de aŭgusto 2008. Legu pli : http://tejo.org/eo/ijk_enkonduko

### Venontaj renkontiĝoj

- Aliĝu al la IJK en Liberec'! 18.7.2009 – 25.7.2009, Ĉeĥio http://www.tejo.org/ijk/;

94a Universala Kongreso de Esperanto, 25a Julio ĝis 1a de Aŭgusto 2009, Białystok, Pollando http://tejo.org/eo/node/787;

ILEI konferenco okazos la 17-25an de julio 2009 en Krakovo, Pollando http://www.ilei.info/agado/Krakovo.php;

Aŭgusto 2009 - Itala Kongreso en Cassino http://tejo.org/eo/node/819;

8. Kekso Esperanto-renkontiĝo (25.09. - 27.09.09) en Dessau, Germanio http://www.tejo.org/eo/node/915;

Venu al someraj kursoj en franca kastelo Greziljono http://gresillon.org/eventoj/programo_staĝoj_2009.doc;

Invito al FESTO!!, 8an ĝis la 15an de aŭgusto, Zwingenberg (Bergstraße), Germanio http://festo.esperanto-jeunes.org/;

7a SOMERE, 1a - 8a de augusto 2009 en Jünkerath, Germanio http://www.esperantoland.org/somere/
8a Novjara Renkontiĝo (NR), 27a de dec. 2009 - 3a de jan. 2010 en Saarbrücken, Germanio http://www.esperantoland.org/nr/
Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ĉ. 14 - 30jaraj) 27-a de dec. 2009 - 3-a de jan. 2010 en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nis/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu